

Joseph Freiherr von Eichendorff,

Matena preĝo

tradukita de Manfred Retzlaff

Profunda estas la silento
Ankoraŭ en la mondo ĉi!
La arboj nur en softa vento
Sin klinas kvazaŭ antaŭ Di'.

Mi sentas min kreita ree,
Mizer' kaj zorgo estas for.
Pro kio mi plendadis vee?
Mi hontas nun en la aŭror'.

Nur kiel pilgrimant' surtreti
Sinjor', la mondon volas mi,
Trairi ĝin kaj ĝoje preti,
Ĝis ree venos mi al Vi.

Se sentas en la kor' deziron
Pri vanta monda gloro mi,
Disbatu, Dio, mian liron
Kaj mi silentos antaŭ Vi.²

*Traduko de la Germana poemo "Morgengebet" de JOSEPH FREIHERR VON EICHENDORFF (*1788-03-10 – †1857-11-26) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (*1938-11-04) en 1984.*

MR-164-1 / Arg-677-1362 (2012-11-24 22:29:52)

Pri la poeto vidu la retejon http://eo.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff respektive la germanan versio de vikipedio http://de.wikipedia.org/wiki/Joseph_von_Eichendorff.

²aŭ:

Mi ĉiam mutos antaŭ Vi.